


La Esperanto-Gironde Informilo



APRILIO 2024

N° 175

# Printempo de l' poetoj



**LA GRÂCE**

Printemps des Poètes – 25 ans  
Du 9 au 25 mars 2024

*Printemps  
des Poètes*

Fabienne Verdier, Pigmentaire imaginaire © ADAGP, Paris, 2024 / Christophe Deschard

**Speciala numero**

**Phil Bosmans**

El la libro *Ŝanco por feliĉo*

## Saluton, kara kunhomo,

Saluton, kara kunhomo,  
Uzu vian tempon por feliĉi.  
Vi estas promenanta miraklo  
sur tiu ĉi tero.  
Vi estas unika,  
neanstataŭigebla.  
Ĉu vi scias tion?  
Kial vi ne surpriziĝas,  
ĝojas, miras  
pri vi mem  
kaj pri ĉiuj aliaj  
ĉirkaŭ vi?  
Ĉu vi trovas tion tiel simpla,  
tiel memkomprenebla,  
ke vi vivas,  
ke vi rajtas vivi,  
ke vi ricevas tempon  
por kanti kaj danci,  
por feliĉi?

Kial do perdi tempon  
en sensenca postkurado  
de mono kaj posedo?  
Kial maltrankviliĝi  
por aferoj morgaŭaj kaj  
postmorgaŭaj?  
Kial disputi, enui,  
droni en sensenca distriĝo  
kaj dormi dum la suno brilas?  
Kviete prenu vian tempon  
por feliĉi.  
Tempo ne estas aŭtoŝoseo  
Inter la lulilo kaj la tombo,  
Sed spaco  
por parki en la suno!

*Jen tipa ekzemplo de blanka poemo ; t.e. poezio sen rimoj.*



## Serge Sire

### Bilbok-logoj

« Plej lerte ludis kun bilbok'  
en akvo lerta orel-fok'.  
Imitis ĝin sencerba bok',  
ĝi ŝvite sinkis kun sufok' ! »

Ref:

Jen estis prelega prolog'  
far tutmond-fama zoolog'



« Ja same provis diplodok' !  
– Fosilon trovis mi en rok'  
de iu varme seka lok'  
en suda limo de Marok' ! »

Ref.

aldonis paleontolog'  
kun helpo de arkeolog'.

« Nu, vane ĉef-monahĥ' en frok'  
trejniĝis sine de l' parok'  
sed spit' al la sukces- Alvok'  
la glob' ventflirtas kiel flock' »

Ref

Diabla estas ĉi arog'  
plor-paŭtis pia teolog'

« Ĵonglistoj, jam en Mezepok'  
kaj plu dum renesanc-barok'  
eĉ ĝis mil naŭcent sesdek ok  
ne trafis truon de l' brelok' ! »

Ref

aŭdiĝas en la dialog'  
jen voĉo de sociolog' !

« Vi, tro vundeblaj pro provok'  
malfirmaj antaŭ ajna ŝok'  
tremimu pro la certa mok'  
de la famul' de Bjalistok' ! »

Ref:

Jen estis debat-epilog'  
far l' plej fuŝiga demagog' !

### Fuŝig de Magog



*Tiu teksto estis premiita de la Beletraj Konkursoj de UEA en 2023. Kaj Serge deziras, ke ĝin blusigu **La Kompanoj**. Ĉu ni do pretigu la muzikon kaj registru tiun kanzonon en la studio de Vinilkosmo en Tuluza? Kiuĵ pretas?*

*Claudine*

## **Poezio? Kiel difini ĝin?**

*Kio estus via difino de poezio ?*

*Ĉu vi konsentas kun la ĉi suba proponita difino ?*

Poezio estas tre malnova literatura ĝenro, prezentanta sin laŭlonge de la jarcentoj en diversaj formoj. Ĝenro, kiu senĉese renoviĝas, kio malfaciligas difini ĝin. Ĝi estas lingva arto, kiu esploras ĉiujn rimedojn kaj celas esprimi aŭ sugesti ion, per ludado de vortoj, sonoj, ritmo, muzikeco. La poemoj povas havi diversajn formojn (soneto, balado, odo, libera verso, kaligramo, hajko ktp.). Ili estas ofte verse skribitaj, foje en prozo.

Verso ofte estas ligita al poezio, sed ne ĉiu poezio estas nepre versigita, same kiel ne ĉiu versigita formo estas nepre poezia. Poezio, origine, estis kantita, akompanita per liro, kiu estigis la nocion de lirika poezio.

*Alia difino donita de Sara (studentino), la 1-an de aprilo 2018*

<http://blog.ac-versailles.fr/voyageenpoesieles4/index.php/post/21/03/2018/Qu-est-ce-que-la-po%C3%A9sie>

### **Poésie**


La poésie  
L'art de donner vie  
À une suite de mots  
Capable de soulager les maux

Poète voire magicien  
Ce pouvoir de créer un lien  
De transmettre des émotions  
Et faire voyager sans avion

Un moyen de se libérer  
D'évacuer toutes ses pensées  
Ou même faire réfléchir  
Créer pleurs et rires

Des images, des odeurs  
De l'amour, de la rancœur  
Tant de sentiments transmis  
Par la poésie

## Ĉu poezio havas specifan celon ?



Poezio povas esti maniero esprimi impresojn, emociojn, sentojn, transporti al aliaj mondoj kaj kritiki sociajn, politikajn mankojn.

Sed ĝi ankaŭ povas havi simplan estetikan kaj distran funkcion.

En 1918, per ĉi tiu kaligramo Guillaume Apollinaire prezentas la Eiffel-Turon kiel simbolon de la forto de Francio antaŭ la germanoj. La aranĝo formas dezajnon / desegnaĵon ligitan al la temo de la poemo.

## De kie originas la vorto "poezio" ?

La etimologio de la vorto "poezio" jam estas interpreto de la poezia fakto : *poiêsis* por la grekoj signifas "kreo", de la verbo *poiein* ("fari", "krei").

Apollinaire, per siaj kaligramoj, proponas poezian kaj vidan kreaĵon, kiu kunigas skribadon kaj desegnadon ludante laŭ la spaco de la paĝo.

Ekzemplo : Apollinaire, "La ponardita kolombo kaj la akvoŝpruco"

El la poezikolekto "*Calligrammes*", subtitolita "Poemoj de Paco kaj Milito" 1913-1916 de Guillaume Apollinaire.

*La colombe poignardée  
et le jet d'eau*

Douces figures poignardées  
MIA MAREYE  
YETTE LORIE  
ANNIE et toi MARIE  
où vous êtes-  
jeunes filles  
MAIS  
près d'un  
jet d'eau qui  
pleure et qui prie  
cette colombe s'extasie

Tous les souvenirs de nos jours  
O mes amis partis en guerre  
Jaillissent vers le firmament  
Et vos regards en l'eau dormante  
Meurent mélancoliques  
Où sont-ils Braque et Max Jacob  
Derain aux yeux gris comme la mer  
Où sont-ils Raynal Billy Dalize  
Où sont les noms se mélanoïent  
Où sont-ils comme des pas dans une église  
Où est Cremlitz qui s'engagea  
Où sont-ils morts déjà  
De souvenirs mon âme se pleine  
Deau pleure sur ma pierre

CEUX QUI SONT PARTIS A LA GUERRE AU NORD SE BATTENT MAINTENANT  
Le soir tombe O sanglante mer  
Jardins où saigne abondamment le laurier rose fleur guerrière

Tio estas kaligramo  
de

Guillaume  
Apollinaire skribita  
ĉe la fronto dum la  
unua mondmilito.

Komence ĝi ne estu  
legata sed  
observinda.

Gravas ĝia vida  
aranĝo.

La vorto "kaligramo"  
elpensita de  
Apollinaire kuntirinte  
du vortojn :  
"kaligrafio" kaj  
"ideogramo", rilatas  
al la beleco de skribo  
kaj celas indiki  
"grafikan poezion".

Tio permesas al vi  
kombini vidan  
imagon kun tiu  
portata de vortoj.

Du desegnaĵoj ilustras la elementojn de la titolo :

•1-a desegnaĵo supre : “ponardita kolombo”: ĉi tiu montras la flugilojn disfalditaj

La ikoneca birdo de paco kaj amo estas ponardita. La milito detruis la amajn rilatojn, kiujn havis la poeto. La kolombo elvokas la perditajn amatinojn, la melankolion.

*Ĉu vi preferas vidi kolombon saltantan super la akvoŝpruco aŭ birdon teren falintan ?*

•2a desegno : “la akvoŝpruco” kun baseno

Ĉi tiu akvoŝpruco rilatas al la temo de nostalgio por disigitaj amikoj.

Apollinaire parolas pri amikoj, kiuj militis : pentristoj (Braque, Derain), poetoj (Max Jacob) ...

La akvoŝpruco sugestas ambaŭ : vertikalan, soran movon sed ankaŭ falon

- apudmeto de maloj- kaj krome povas esti interpretita kiel plorado.

Koncerne la bazon de la desegno, ovala formo, ĝi sugestas la lageton de la akvoŝpruco, sed ankaŭ buŝon aŭ malfermitan okulon verŝanta larmojn kun sia pupilo (O) en la centro.

Eblas reverki la tekston kiel tradician poemon, por pli facila legado de la teksto mem.

Douces figures poignardées chères lèvres fleuries

Mya Mareye

Yette et Lorie

Annie et toi Marie

Où êtes-vous ô jeunes filles

Mais près d'un jet d'eau qui pleure et qui prie

Cette colombe s'extasie

Tous les souvenirs de naguère

O mes amis partis en guerre

Jaillissent vers le firmament

Et vos regards en l'eau dormant

Meurent mélancoliquement

Où sont-ils Braque et Max Jacob

Derain aux yeux gris comme l'aube

Où sont Raynal Billy Dalize

Dont les noms se mélancolisent

Comme des pas dans une église

Où est Cremnitz qui s'engagea

Peut-être sont-ils morts déjà

De souvenirs mon âme est pleine

Le jet d'eau pleure sur ma peine.

Ceux qui sont partis à la guerre

au Nord se battent maintenant

Le soir tombe Ô sanglante mer

Jardins où saigne abondamment

le laurier rose fleur guerrière.

Guillaume Apollinaire

—  
tout terriblement





## Règles de versification

La **versification** est l'ensemble des règles de rime et de longueur qui accompagnent une écriture en vers. Ils obéissent à des usages (différents selon les langues) réglant la pratique du vers. Du respect de telles contraintes, dépendra, dans une culture donnée et à une époque donnée, la reconnaissance d'un énoncé en tant que vers.

Il n'existe pas de propriété intrinsèque qui permette de distinguer, infailliblement et pour toutes les cultures, le vers du « non-vers ».

Les règles de versification varient selon les pays.

Beaucoup d'entre nous ont appris durant leur scolarité, que le vers français "classique" est défini comme « un élément linguistique comptant un nombre déterminé de syllabes (*pieds*), dont certaines sont obligatoirement accentuées et dont la dernière rime avec la syllabe correspondante d'un ou de plusieurs autres vers. »

(Cette définition exclut le vers « blanc » (non rimé), de même que le « vers libre », dont le nombre de syllabes peut ne connaître aucune régularité.)

D'autres versifications européennes s'étudient le plus souvent par le nombre d'accents.

La **versification** codifie également le regroupement en strophes, le jeu des rythmes et des sonorités comme les types formels de poèmes ou les genres poétiques déterminés par leur contenu. Terme au contenu purement technique, la versification se distingue de « l'art poétique », lequel renvoie à des esthétiques de la poésie revendiquées par une personne ou un groupe.

En poésie littéraire imprimée, le vers est souvent repérable grâce à un retour à la ligne indépendant de la bordure de la page. Le vers est souvent associé à la poésie, mais toute poésie n'est pas forcément versifiée, de même que toute forme versifiée n'est pas nécessairement poétique.

<https://fr.wikipedia.org/wiki/Versification>

Il pourrait être intéressant de mener une étude comparative de différentes versifications : espéranto, européennes ou autres.

### Ce thème tente-t-il l'un d'entre vous ?

Si oui, cela pourrait être une idée à approfondir en vue du prochain printemps des poètes l'an prochain.

- poésie et versification en anglais,
- en espagnol,
- en espéranto,
- le *haïku*
- etc.... toute autre suggestion bienvenue

\*\*\*\*\*

*Eric*

*El « Aleo aŭtuna » de Lidia Lageza  
publikigita en Krakovo en 1987*

## Mankas tempo

al ni mankas tempo  
por iri kafejon  
admiri sunsubiron  
atente nin aŭdi

ne skuas cin  
mia voĉo en telefono  
koverton kun cia letero  
mi akceptas sen kortuŝo

ci devas verki  
mi devas legi  
aŭ  
ci devas legi  
mi devas verki  
aparte

dum raraj interkomprenoj  
pli rolas al kutimiĝo  
timo de malpleno  
specife komprenata lojaleco  
verŝajne ĝustas tempo  
jam por nova amo



## Poésie en Ukraine – Ukraina poezio

<https://www.recoursapoeme.fr/6-poetes-ukrainiens/>

La littérature ukrainienne a une longue tradition qui remonte au XI<sup>e</sup> siècle. La poésie et l'histoire sont encore étroitement liées dans l'Ukraine contemporaine, où la poésie vit sous une grande diversité de styles. Les bouleversements politiques du pays, ces dernières décennies (de la révolution de Maïdan à l'annexion de la Crimée par la Russie, à la guerre du Donbass), avaient amené l'éclosion d'une poésie audacieuse et directement politique, avec des lectures et des représentations souvent très suivies.

Soldat, mais aussi poète, **Maksym Kryvtsov** (1990-2024) était engagé dans la guerre ukrainienne depuis 2014. Il est décédé le 7 janvier 2024, tué lors de combats avec l'armée russe.



Soldato, sed ankaŭ poeto, **Maksym Kryvtsov** (1990-2024) estis engaĝita en la ukraina milito ekde 2014. Li mortis la 7-an de januaro 2024, mortigita dum bataloj kun la rusa armeo.

Je vous invite à découvrir ci-dessous la traduction de son dernier poème. Que sa voix continue de s'élever contre le bruit des chars et des canons. Parce que la poésie est le dernier recours de l'esprit et de l'humain, face à la violence et la barbarie.

Mi invitas vin malkovri la tradukon de lia lasta poemo ĉi-sube. Lia voĉo daŭre altiĝu kontraŭ la bruo de tankoj kaj kanonoj. Ĉar poezio estas la lasta rimedo de la spirito kaj de la homaro, fronte al perforto kaj barbareco.

Ma tête roule de lisière en lisière  
entre les tranchées  
comme une boule d'herbes sèches  
comme une balle  
mes bras arrachés  
feront des violettes au printemps  
mes jambes  
seront emportées par les chiens  
et les chats

mon sang  
peindra le monde d'un rouge  
nouveau

Pantone sang humain  
mes os  
s'enfonceront dans la terre  
formeront une carcasse  
ma mitrailleuse trouée  
rouillera  
la pauvre  
mes affaires de rechange et  
mon équipement  
iront aux nouvelles recrues  
vivement le printemps  
pour qu'enfin  
je repousse  
en violette.

Mia kapo ruliĝas de rando al rando  
inter la tranĉeoj

kiel bulo el seka herbo  
kiel pilko  
miaj disŝiritaj brakoj  
igos violojn printempe  
miaj kruroj  
estos forportitaj de hundoj  
kaj katoj

mia sango  
pentros la mondon per nova tono  
de ruĝo

*Pantona* homasanga  
miaj ostoj  
enprofundiĝos en la teron  
fariĝos kadavro  
mia mitraleto truita  
rustos  
kompatinda  
miaj tornistraj aferoj kaj  
ekipaĵo  
provizos novajn rekrutojn  
venu printempo  
por ke mi finfine  
povu rekreski  
en violon.

### ***Maksym Kryvtsov***

Traduit de l'ukrainien  
par Nastasia Dahuron

Tradukita helpe de  
Aŭtomata retprogramo

Poezio estas literatura ĝenro kiu uzas vortojn kaj ritmojn por esprimi emociojn, ideojn kaj bildojn en arta maniero. Ĝi povas preni malsamajn formojn, kiel liberan version, sonetojn aŭ hajkojn. Poezio ofte estas uzata por transdoni profundajn sentojn kaj pensojn pri la mondo ĉirkaŭ ni.

Katya

**Taras Ŝevĉenko** (1814-1861)

Tradukis Oleksandr Koroleviĉ



## Testamento

Як умру, то поховайте  
Мене на могилі,  
Серед степу широкого,  
На Вкраїні милій,  
Щоб лани широкополі,  
І Дніпро, і кручі  
Було видно, було чути,  
Як реве ревучий.  
Як понесе з України  
У синєє море  
Кров ворожу... отоді я  
І лани і гори —  
Все покину і полину  
До самого Бога  
Молитися... а до того  
Я не знаю Бога.  
Поховайте та вставайте,  
Кайдани порвіте  
І вражою злою кров'ю  
Волю окропіте.  
І мене в сім'ї великій,  
В сім'ї вольній, новій,  
Не забудьте пом'янути  
Незлим тихим словом.



Kiam ĉesos lasta spiro  
en la brusto mia,  
enterigu min en vasta  
step' Ukrainia,  
ke mi vidu kampojn, montojn -  
tutan karan landon,  
ke mi aŭdu de l' krutaĵo  
Dniproan hurl-muĝadon.  
Kiam bruaj Dniproj ondoj  
portos de l' kamparo  
mavan sangon malamikan  
al la blua maro,  
tiam mi al dio iros,  
forlasinte ĉion,  
preĝi pie... Sed ĝis tio  
mi ne konas dion.  
Enterigu kaj leviĝu.  
ŝiru katenerojn  
kaj per sango malamika  
ŝprucu la liberon.  
Kaj en nova familio -  
granda kaj libera -  
ne forgesu rememori  
min per vort' sincera.

Taras Shevchenko (marto 9, 1814-marto 10, 1861) estis farbisto, poeto, etnografo, publika figuro. La poeto naskiĝis en familio de servutuloj. En tiu tempo, Ukrainio perdis sian ŝtatecon. Ĝiaj teroj estis dividitaj inter du imperioj: rusa kaj aŭstra. La registaroj de tiuj imperioj abolicis ukrainan legaron kaj finfine enkondukis servuton.

T. Ŝevĉenko en sia poeziokolekto "Kobzar" prezentis la pasintecon kaj nunecon de la ukraina popolo, ĝian historion kaj geografion.

Lia poezio donis vizon de la estonteco: se Ukrainio havis sian propran ŝtaton en la pasinteco, ĝi signifis ke ĝi devus akiri sendependecon en la estonteco."

Lia *Testamento* estas alvoko al la liberiĝa lukto de la ukraina popolo el sklavigo, kaj ne perdas sian gravecon hodiaŭ.

*Ekzistas 3 monumentoj al la poeto en Francio.*

*La unua sur la antaŭa paĝo staras en Parizo ĉe la bulvaro Saint-Germain sur la placo nomita Taras Ŝevĉenko.*

*La ĉi-apuda en Châlette-sur-Loing (45),*

*La ĉi-suba en Tuluzo en la distrikto Bellefontaine.*

*Katya*

### "Kun graco"

**Kun graco por homoj  
Aĝon necesas vivi!**

**Kun amo al gepatroj  
Kiu vekos la memorojn  
Vi bezonas vivi!**

**Kun graco por homoj  
Inter kiuj vi vivas,  
Aĝon necesas vivi!**

**Kun amo por infanoj  
Kiu malfermos al vivo,  
Per la vojo, kiun vi submetos por ili,  
Ili bezonas vivi!**

**Sincera dankem'  
Simila al poezi'  
Elparolas vi  
\*\*\***

**Hela printempo  
Kun graco milde lumas  
Ĉarma reviviĝ'  
\*\*\***

**Suno subiras  
Trankvilaj maraj ondoj  
Momento ĉarma**



**Claude Piron**

## Poésie et espéranto

Il est absurde de juger une langue en demandant à une personne rencontrée par hasard (fût-ce sur la Toile) de traduire un poème. Seul un poète est capable de le faire, et de très nombreux poèmes sont de toute façon intraduisibles. Ces dames ont sans doute fait de l'anglais pendant des années. Peuvent-elles fournir du jour au lendemain une version poétiquement acceptable de ce texte? Il existe une traduction des *Fleurs du Mal* en espéranto. Si je ne me trompe, c'est dans ce recueil qu'a paru le poème en question. Il faudrait consulter cette traduction. Elle est peut-être excellente. Mais elle est peut-être médiocre. Tout dépend, non des caractéristiques de la langue, mais du talent du traducteur.

J'ai sous la main la traduction de *L'albatros* de Baudelaire en anglais et en espéranto. La traduction en espéranto est beaucoup plus proche de l'original, ne fût-ce que parce que la version anglaise change complètement le rythme (sans compter qu'elle traduit "souvent" par "sometimes", qui veut dire "parfois", ce qui n'est pas la même chose):

Souvent pour s'amuser, les hommes d'équipage  
Prennent des albatros, vastes oiseaux des mers,  
Qui suivent, indolents compagnons de voyage,  
Le navire glissant sur les gouffres amers.  
(Baudelaire)

Sometimes for sport the men of loafing crews  
Snare the great albatrosses of the deep,  
The indolent companions of their cruise  
As through the bitter vastitudes they sweep.  
(Traduction de Roy Campbell)

Multfoje por amuzo ŝipanoj kapt-akiras  
Albatrojn, ĉi grandegajn ventbirdojn de la mar',  
Kiu, indiferentaj vojaĝkunuloj, iras  
Post ŝip' glitanta super amara abismar'.  
(Traduction de Kalman Kalocsay)



Autre exemple, le poème de William Blake qui commence par "Tiger, tiger, burning bright...". La traduction française de Félix Rose est "Tigre, tigre, flamboyant d'ardeur..." Cette traduction est bien inférieure à la version de William Auld en espéranto: "Tigro, tigro, brile brula...", qui respecte la concision, le rythme et l'allitération.

Ces dames arriveraient-elles à traduire en français, en rendant son atmosphère poétique, le vers de la poétesse espérantophone tchèque Eli Urbanová: "La dolĉe lula belo betula"? La traduction littérale "La beauté doucement berceuse du bouleau" perd tout l'impact poétique, faute de respecter le rythme et les allitérations. Pourraient-elles traduire les vers du Letton Kurzens:

"Ankoraŭ devas nigri vera nokto  
ankoraŭ devas fajri vera tago  
ne povas ja de grizo ĉio pleni"?

Personnellement, bien que de langue maternelle française et ancien traducteur professionnel, je ne vois pas comment rendre ces vers. Le français a "verdoyer" et "rougeoyer", mais pas de mot qui corresponde à l'espéranto "nigri". Rien que la modification de la place des mots, obligatoire pour rendre ces phrases en français normal, fait perdre tout l'impact poétique:

"Une vraie nuit doit encore "nigroyer"  
un vrai jour doit encore éclairer comme un feu  
tout ne peut n'être que grisaille".

Comment transposer cela en langage poétique, avec la force que donnent à l'original et la place des mots et la liberté lexicale due au système de terminaisons (qui permet ici d'employer les concepts "noir", "feu" et "plein" comme verbes à l'infinitif)?

Autre exemple: la formule confucéenne qu'on traduit en français par "Que les pères jouent leur rôle de pères et les fils leur rôle de fils" ou "Que les pères agissent en pères et les fils en fils". Elle est beaucoup moins exacte, par rapport aux quatre mots de l'original chinois, que la traduction en espéranto "Patro patru, filu fil" , où l'aspect lapidaire et poétique de la formule chinoise se trouve totalement respecté, de même que le sens de la phrase, beaucoup plus large que les sens restreints que présentent les traductions françaises.

Je termine par un exemple de traduction poétique de l'allemand, un poème de Heine:

Ein Fichtenbaum steht einsam  
Im Norden auf kahler Höh'.  
Ihn schläferf; mit weisser Decke  
Umhüllen ihn Eis und Schnee.

Er träumt von einer Palme,  
Die, fern im Morgenland,  
Einsam und schweigend trauert  
Auf brennender Felsenwand.





Le rythme, les rimes et les images sont pleinement respectés dans la traduction en espéranto:

Piceo staras norde  
Sur kalva mont' en sol'.  
Ĝi dormas; glacio, neĝo  
Ĝin tegas per blanka tol'.

Kaj sonĝas ĝi pri palmo,  
Kiu en suda land',  
Sola, funebra, mutas  
Sur ardo de rokovand'.

La deuxième strophe, en particulier, est remarquablement proche, à tous égards, de l'original allemand. Cela tient à plusieurs facteurs, dont les caractéristiques grammaticales de la langue, sa grande souplesse et le fait que le lexique est statistiquement plus proche du lexique des grandes langues européennes que celui de chacune de ces langues: les racines "palm", "land" et "vand" existaient en espéranto, avec leur sens allemand, bien avant que ce poème ne soit traduit. La probabilité de trouver en espéranto une expression très proche de l'original est statistiquement plus grande qu'avec les autres langues. Il est manifeste que dans ce rôle de traducteur de poésie l'espéranto n'a rien à envier aux autres idiomes.

\* \* \* \*

<https://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-117-livre-du-mois>

## « 22 Poèmes en espéranto » de Bronisław Kamiński

Par Sylvain Barrier

En fouillant les archives du poète **Bruno Durocher**, sa veuve, Nicole Gdalia, retrouve une série de poèmes datés de 1946 ou 1947. Surprise : le recueil de poésie est écrit en espéranto. Et soudain, l'histoire du poète, déjà haute en couleur, prend également la teinte verte de la langue internationale. (...)

Pour la bonne compréhension, le traducteur, Sylvain Barrier, a annoté certains éléments restés à l'état de brouillon. Le tout est additionné des partitions signées Jean-Claude Patalano, du groupe Vojaĝo :

(<http://www.vojaĝo-muziko.fr/fr/groupe-fr.html>).

Ce recueil a fait l'objet d'une présentation à la BNF :

<https://www.bnf.fr/fr/mediatheque/la-poesie-de-bruno-durocher-en-esperanto-1946> et <https://www.bnf.fr/fr/mediatheque/mise-en-musique-de-3-poemes-en-esperanto-de-bruno-durocher>.

22 poèmes en espéranto, de Bronislaw Kaminski  
*Paru le 18/06/2019, aux éditions Caractères (71 pages, 25 euros)*



*Kelkaj paroloj  
de la ĈEFO SEATTLE*

*En 1854, la prezidento de Usono proponis aĉeti grandan zonon de la indiana teritorio kaj promesis «rezervejon» por la senlandigitaj triboj.  
Jen la respondo de la Ĉefo Seattle:*

«La granda Blanka Homo en Vaŝingtono sciigas al ni, ke li volas aĉeti nian landon.

Tamen, kiel vi povas aĉeti aŭ vendi la ĉielon, la tervarmon...?

Tiu ideo ŝajnas al ni stranga. Se ni ne posedas la freŝecon de la aero kaj la brilspeguladon de la akvo, kiel povas vi ilin aĉeti?

Ni estas parto de la tero kaj ĝi estas parto de ni. La bonodoraj floroj estas niaj fratinoj; la cervo, ĉevalo, granda aglo estas niaj fratoj... ĉiu spektra brilo en la klara akvo de la lagoj elvokas eventojn kaj memorojn pri la vivo de mia popolo.

La murmuro de la akvo estas la voĉo de la patro de mia patro.

La riveroj estas niaj fratinoj; ili sensoifigas nin, portas niajn kanuojn kaj nutras niajn infanojn.

La aero estas grandvalora por la Ruĝa Homo, ĉar ĉiuj aĵoj kunhavas la saman blovon: la besto, la homo, ĉiuj devenas de la sama spiro. La vento, kiu donis al mia avo lian unuan spiron, ankaŭ lian lastan spiron ricevis.

Mi estas sovaĝulo, tial mi ne konas alian vivmanieron.

Mi vidis milojn da bizonoj putriĝantaj sur la herbejoj, forlasitaj de la Blanka Homo, kiu pafis ilin el veturanta trajno. Mi estas sovaĝulo kaj mi ne komprenas, kial la ferĉevalo fumanta povas esti pli grava ol la bizono, kiun ni, indianoj, mortigas nur por vivteni nin. Kio estas la Homo sen bestoj?

Ĉiuj aĵoj rilatas inter si kiel la sango, kiu interligas samfamilianojn.

Ni scias almenaŭ tion: la tero ne apartenas al la Homo; la Homo apartenas al la tero.

Tion ni scias.»

## ***Jef Last***

El la libro *La hispana tragedio*

El la nederlanda lingvo tradukis G.J. Degenkamp

### **LA HISPANA JUNULARO**

Knaboj en aĝ' ankoraŭ infanaj,  
bravaj junuloj, filoj hispanaj:  
“Viro mi iĝos, vokas min fronto;  
al la danĝer' mi iros renkonte;  
kaj se min antaŭ viraĝa forto  
en la batalo trafos la morto,  
do en la tombo viro mi estu,  
kun la dezir', ke min nur postrestu  
lumo de l' suno min ĝojiganta,  
mia kuraĝ' en fratoj flamanta”.  
(...)

Al la tranĉeoj ili rapidis,  
ĉar en la koro firme decidis:  
“Semi ni volas semojn de l' vero,  
kiujn neniu ŝiros el tero”.  
Kaj se la mort' al ili aperas,  
pri la rikolt' falĉisto fieras.  
(...)

Vi, junularo, gloron aliros,  
ĉiam triumfos, venkon akiros;  
se Hispanion premos minaco,  
vi ĝin elsavos; venos jam paco.  
Morti per glav' ni volas prefere  
ol sub teroro sklavi mizere,  
ol senespere vivi turmente,  
ol vegetadi honte kaj pente.



Se el la urboj cindro nur restos,  
kiel el cindro flamoj protestos,  
tiel eksonos flame la krio,  
lasta esprim' en mortagonio:  
“Por Hispani' la vivon ni portis!  
Ho, Hispani', por kiu mi mortis!

*Laŭ Miguel Hernández*

**KIM Gwangseop** 김광섭 (verkisto)  
Tradukis **CHOE Taesok**  
El Seulo sendis **PARK Haesim**

## Vivo

Se vi celas sola havi  
ion troe grandan, multan,  
vivo estas la milito sepdekjara,  
kiu estas malfeliĉa, senkompata.  
La ekzisto de ĉi mondo estas ne pro tio.

Dio donis al kormalriĉuloj  
ĉi nekompareble grandan universon,  
en kiu tage suno lumas,  
nokte steloj brilas,  
por ke ili ĝin rigardu senkondiĉe  
por la paco kaj feliĉo.

*Originale korealingve*

## 인생 (titolo)

너무 크고 많은 것을  
혼자 가지려고 하면  
인생은 불행과 무자비한  
칠십 년 전쟁입니다  
이 세계가 있는 것은 그 때문이 아닙니다

신은 마음이 가난한 자에게  
평화와 행복을 위하여  
낮에는 해 뜨고  
밤에는 별이 총총한  
더없이 큰  
이 우주를 그냥 보라고 내주었습니다



## Graco-poemo

Mi lernas Esperanton  
Kaj tamen mi lanĉis min.  
Mi skribis poemon.  
Kun tradukilo por helpi min,  
Mi uzis retajn rimedojn,  
Sen vortaro de sinonimoj.  
Pardonu erarojn!  
Kaj ne kondamnu min!  
Donu al mi gracon!  
Kaj eble post dek jaroj  
En similaj renkontiĝoj  
Mi povos flue paroli,  
Kun Klodin' por min helpi,  
Sen forgesi Marcelon.  
Por realigi la sonĝon,  
Ĉiuj ĉeestantoj,  
Ni alvoku la gracon.

*Jean-François WARNIER  
G.E.M.E.*



## Poemoj senditaj de Monique

Se mi havus talenton

Se mi havus la talenton  
Min esprimi poezie,  
Ne hezitus mi momenton  
Por verki vortebrie.

Per poemoj flue glataj,  
Kiuĵ kantas harmonie,  
Mi, per vortoj delikataj  
Vin salutus melodie.

Per novelo absorbanta  
Mi volonte vin regalus.  
Kaj per stilo eleganta  
Kun Valano mi rivalus.

Sed, ho, mankas rimosento  
Kaj florriĉa fantazio,  
Mankas lingva kompetento  
Do, finfine, mankas ĉio.

*Lilli Giloteaux*

Transloĝiĝo

Mi kreis kadron ĉirkaŭ mi,  
Kadron hejmeĉan kaj praktikan.  
Molaj tapiŝoj komfortas  
Kaj zorgeme elektitaj bildoj  
Ornamas la murojn.  
Mi ame aldonis mil objektojn:  
Libroj, lampoj, floroj.

Dum momento min ĝojigis  
La enhejma beleco kaj konsento.  
Sed baldaŭ  
Ĝi ne plu kontentigis min.  
Mi serĉas ion alian,  
Ion nekonatan.  
Serĉas ĉirkaŭ mi:  
Novan taskon, novan vojon,  
Serĉas en mi,  
Serĉas min mem.

*Lilli Giloteaux*



## Mano

Ni rigardas de l'infano  
La kvin fingrojn de la mano.  
Tio estas ne komplika.  
Ni komencas per la dika:  
Ĉiuj beboj tre volonte  
Ĝue suĉas ĝin senhonte.  
Per la dua je bezono  
Ni indikas al persono  
Ĝustan vojon aŭ direkton,  
Montras lokon aŭ objekton.  
Jen la trian ni nun levas.  
Kiun nomon ĝi ricevas?  
"Meza fingro" mi sugestas,  
Ĉar enmeze ĝi ja estas.  
Kvaran fingron ni plej amas,  
Kaj per ringo ĝin ornamas.  
Al la kvina mankas forto,  
Tamen gravas ĝia sorto:  
Purigado de orelo  
Estas ĝia ĉefa celo.  
Ĉiujn fingrojn de la mano  
Fine konas la infano.

*Lilli Giloteaux*

## Filineto

Aperis vi kiel suneto en mia vivo  
De iu venis vi planedo kun beba lingvo  
Kaj mi aŭskultas ĉiun tagon vian rakonton  
Pri longaj jaroj da vagado en granda kosmo.

Vi sentis vin solece tie, sed vi ne ĝemis  
Kaj longa estis vojo via al via hejmo  
Sed ni finfine renkontiĝis, animo mia  
Nenio povas nin disigi mi certe scias.

Vi dormas mia eta stelo sur manoj miaj  
Vi estas nekredeble bela, mia filino  
Jam vi ridetis en la dormo vi eble vidas  
Ke iu bona eta gnomo apude sidas.

Mi lasas vin kun via sonĝo kaj fermas pardonon  
Vin granda kaj feliĉa mondo atendas morgaŭ  
Kaj vi forgesos pri soleco, mia anĝelo  
Ja bonan vivon vi komencas sub la ĉielo.

Vi kiel ĉarma mirakleto en vivo mia...

*Ĵomart Amzeev (Ĵomart kaj Nataŝa)*



## ***Kio estas gracieco...?***

***Kio estas gracieco se ne  
via silueto sur la lito,  
la mildeco de via tuŝo  
kaj la profundo de via rigardo?***



***Kio estas gracieco se ne  
via eleganta sinteno,  
kaj via fidela ĉeesto  
ĉe ĉiu el miaj paŝoj?***



***Kio estas gracieco se ne  
senti vian varman spiradon  
en la kavaĵo de mia kolo same  
kiel la vibroj de viaj ronronoj.***

***Kio estas gracieco  
sen menciigado?***

***Nur malvarma termino  
malplena de signifo.***



**Iberla WARNIER-CONTRERAS..  
G.E.M.E.**





# KONDAMNITE

William AULD  
el *Spiro de l' pasio*

En ĉi dezerto morna jen mi sidas  
sola, kaj sube jam la ter' pulsadas  
pro l' pezaj, metronome paŝaj plandoj  
de l' Monstro hida. Senutilas plendoj,  
lamentoj, petoj pri indulgo, veoj:  
ĝi ne devios de l' sangspuraj vojoj.  
La Monstro venas, certe kiel morgaŭ,  
sen ŝanco pri evito, sava merg' aŭ  
forkuro saĝa por la trema nuno.  
Solec' terura, senrimeda nano!

Forgutis tute nia civilizo.  
Sub la kaldron' malplena jam neŭrozo  
varmigas ĝis eksplod-temperaturo  
la gasojn de l' militprepara tero.  
Eble ne estingiĝos homa raso:  
le iama usonan' aŭ ruso  
popolamason eble regeneros  
kaj nova civilizo pioniros  
laŭ sago de Jesuo aŭ Lenino.  
Sed vi ne vidos ĝin, ducola nano!

Ne gravas via volo. Nur la pacon  
deziras vi, ne fremdan teropecon.  
Vin kontentigus paco kaj laboro,  
sed tamen vi batalos pro "libero" —  
sole liberon morti vi posedas!  
En faŭkon de l' milito vi pasadas  
hipnote, konfuzite, malgraŭvole.  
Ĉi-lastan kanton verkas mi revule,  
dum jam aŭdiĝas grumblo de kanono:  
la tempo elĉerpiĝas, bleka nano!



*Elektita de Yannick*

# PRINTEPAJ HAJKOJ

*Elvezio*

I

Vento blovas  
Blankiĝas la nokto:  
Ĉerizarbo dancas

II

Akvo moviĝas  
Ĉirklaj ondetoj  
Raneto saltas  
Malfrostiĝas la lago

III

Blua ĉielo  
Blankaj pintoj  
Verdaj valoj  
Nigra maro  
Bunta kamparo

IV

Abelo laboras  
forflugas papilio  
Rozo odoras

V

Helas la aero  
Suno leviĝas  
Tero puŝas  
burĝonoj ornamas la branĉaron

VI

Briletas pala luno  
Leviĝas blanka fumo  
Blekas hundo

kronas primoloj ĝardenojn

VII

Folioj flustras  
Branĉo kapjesas:  
Hirunda balancilo

VIII

Malhela nuboj  
Brila efluvo:  
fulmotondro grumblas

IX

Aero sereniĝas  
Pluveto plu falas:  
ĉielarka brakumo



## La silenta strat'

Ofte ŝi promenis  
En silenta strat'  
Kaj en mano tenis  
Manon de l'amat'

Longe ŝi silentis  
En silenta strat'  
Kaj sur buŝo sentis  
Buŝon de l'amat'

Multe ŝi promesis  
En silenta strat'  
Kaj ŝi... nur forgesis  
Nomon de l'amat'...

Rajmondo ŜVARC  
(*Elektita de Rose*)

## Karnavalo

Ĝojgaja filo sen hezito  
Trinokte dum la karnavalo  
Forrestis de la hejma lito.  
La kaŭzo estis... nur detalo.

Sed, kiam hejmen li revenis,  
Tre lacigita post la festo,  
Severa patro ekzamenis  
Lin senkompate pri foresto.

Kaj tiu patro scivoleme  
Eĉ pri l' detal' sin interesis  
Dum lia filo ruz-sentreme  
Nur parton de l' detal' konfesis!

Sed premis patro lin katene:  
«Vi kie restis post la balo?»

.....  
«Nu, post la balo, ĝismatene  
Mi restis... jes... en karna valo!»

Rajmondo ŜVARC  
(*Elektita de Bernardo*)



# POEMOJ VERKITAJ DE GLORIA

## FEMMES

Être libre de vivre comme on le souhaite,  
Être maîtresse de son corps et de son cœur,  
Les femmes veulent enfin connaître ce bonheur,  
Mais bien peu encore savourent cette conquête.

Les bigots, qui relèvent la tête, les rosses,  
Brandissent crucifix et autres jous anciens,  
Comme au temps où être femme ne rimait à rien,  
Si ce n'est à trimer et à faire des gosses.

Laissons-les dire, mais empêchons-les de faire  
Car ils sont bien capables de vouloir revenir  
A ces temps où les femmes préféraient mourir,  
Plutôt que d'enfanter un petit de la misère.

« Le pape a dit... » mais on s'en moque, vois-tu !  
Que sait-il des corvées et des vies misérables  
Passées dans des taudis, sans rien mettre sur la table  
Car trop d'enfants sont là, affamés, mal vêtus ?

Un enfant ? Quel bonheur lorsqu'il est attendu !  
Et qu'il arrive enfin auprès d'un couple heureux  
Qui l'ont, de tout leur cœur, souhaité, conçu,  
Lui donnant leur amour, l'accueillant de leur mieux.

Les femmes et leurs filles se battent aujourd'hui  
Pour préserver le droit, simplement, d'être femmes  
Et mères quand le moment est, par elles, choisi  
Sans que certains machos veuillent en faire un drame !



## LE PRINTEMPS

Un matin, au réveil, on sent la nuit finie,  
L'air a une douceur, un parfum singulier,  
Le merle siffle à tue tête, bien réveillé,  
On remarque que la chatte soudain s'est arrondie.

Le prunier laisse choir des flocons de pétales  
Sur l'herbe humide et verte, où poussent pâquerettes.  
Un hérisson trotte et va faire emplette  
De graines oubliées, de noisettes bicéphales.

Jonquilles et narcisses se haussent de leur mieux  
Vers rosiers en boutons, prometteurs de beauté,  
Et qui somnolent encore attendant mois de Mai  
Pour éclater de joie, du pourpre au blanc crémeux.

La sève monte et pousse jusqu'au bout des bourgeons,  
La vie bouillonne partout où règne la nature,  
Les oiseaux préparent le nid de leur progéniture,  
Les toutes jeunes filles rêvent de grands horizons.



## Grândola Vila Morena (Grândola Ville Brune)

Diffusée à la radio portugaise le 25 Avril 1974, elle déclencha la Révolution des Œillets qui mit fin à la dictature que le Portugal endurait depuis 1933.

**Grândola vila morena**  
**Terra da fraternidade**  
**O povo é quem mais ordena**  
**Dentro de ti ó cidade**

*Grândola ville brune*  
*Terre de fraternité*  
*Le peuple est celui qui commande le plus*  
*En toi, cité*

**Dentro de ti ó cidade**  
**O povo é quem mais ordena**  
**Terra da fraternidade**  
**Grândola vila morena**

*En toi cité*  
*Le peuple est celui qui commande le plus*  
*Terre de fraternité*  
*Grândola ville brune*

**Em cada esquina um amigo**  
**Em cada rosto igualdade**  
**Grândola vila morena**  
**Terra da fraternidade**

*A chaque côté un ami*  
*A chaque face, l'égalité*  
*Grândola ville brune*  
*Terre de fraternité*

**Terra da fraternidade**  
**Grândola vila morena**  
**Em cada rosto igualdade**  
**O povo é quem mais ordena**

*Terre de fraternité*  
*Grândola ville brune*  
*A chaque face l'égalité*  
*Le peuple est celui qui commande le plus*

**À sombra de uma azinheira**  
**Que já não sabia a idade**  
**Jurei ter por companheira**  
**Grândola a tua vontade**

*A l'ombre d'un chêne vert*  
*Qui ne connaît pas son âge*  
*J'ai juré d'avoir pour compagne*  
*Grândola, ta volonté*

**Grândola a tua vontade**  
**Jurei ter por companheira**  
**À sombra de uma azinheira**  
**Que já não sabia a idade**

*Grândola, ta volonté*  
*J'ai juré d'avoir pour compagne*  
*A l'ombre d'un chêne vert*  
*Qui ne connaît pas son âge*

*Kantita de Dominiko kaj Fernando*



Ni deziras elvoki la historion de **Luis Sepúlveda**, ĉilia verkisto. Temas pri bela legendo kun katoj, valoroj kaj poeto:

### **RAKONTO PRI IU MEVO KAJ LA KATO, KIU INSTRUIS ĜIN FLUGI**

(Luis Sepúlveda, *Histoire d'une mouette et du chat qui lui apprit à voler*, Métailié ed.)

*Zorbas, la granda nigra kato, promesis al la mevo, kiu venis por morti sur ĝia balkono, kovri ĝian ovon, protekti la birdidon kaj instrui al ĝi flugi. Ĉiuj katoj en la haveno de Hamburgo mobiliziĝos por helpi lin plenumi ĉi tiujn nekutimajn promesojn.*

*La ido kreskas. La tempo pasis. Restas instrui al ĝi flugi. Sed ĉi-foje, enciklopedio ne plu sufiĉas. Nek Zorbas nek la aliaj katoj povas instrui flugi al la mevido Afortunada.*

*Ĉe la fino de siaj resursoj, Zorbas lastaŝance petas permeson rompi la tabuon kaj paroli al homo. La katoj renkontiĝas en konsilio kaj poste venas al interkonsento. Sed ili fidas nur la «homon» de la katino Bouboulina, ĉar li estas ankaŭ poeto. Tiamaniere, malgraŭ la densa pluvo kiu falis, ili foriris tiun saman vesperon, ĉar la poeto kredis al poemo nomita "La Mevoj" de Bernard Atxaga, kiu diris, ke la koroj de mevoj, similaj al tiuj de ŝnurdancistoj, sopiras nenion plian ol simplan pluvon. Ili ĉiuj grimpas al la supro de la vilaĝa sonorilturo en ŝtorma nokto. La homo kaj Zorbas kuraĝigas la mevon, kiu timas ekflugi. Afortunada finfine ŝajne falas kiel ŝtono kaj malaperas de ilia vido.*

La homo kaj la kato metis la kapojn super la balustradon kaj vidis ĝin svingi la flugilojn, flugante super la parkejo. Ĝi foriris supreniĝante super la babordajn grupojn, super la mastojn de la boatoj, kaj ĝi ŝvebis reen kaj rondflugis ĉirkaŭ la preĝeja turo.

- Mi flugas! Zorbas! Mi scipovas flugi! ĝi ekkriis, eŭfora, el la vasteco de la griza ĉielo. La homo karesis la dorson de la kato.

- Nu, kato, ni sukcesis, li diris, suspire.

- Jes. Sur la rando de malpleno, ĝi komprenis la plej gravan aferon, Zorbas miaŭis.

- Ho jes? Kaj kion ĝi komprenis? demandis la homo.

- Flugas nur tiu, kiu kuraĝas, miaŭis Zorbas. (\*)

- Mi opinias, ke mia kunesto ĝenas vin nun. Mi atendos vin malsupre.

Kaj la homo foriris. Zorbas staris rigardante la mevon ĝis li ne plu sciis, ĉu estas la pluvogutoj aŭ la larmoj, kiuj malklarigis ĝiajn flavajn okulojn de kato granda, nigra, de kato bona, de kato nobla, de kato havena.

*Familio Warnier*

(\*) poeto laŭ Zorbas: "Li eble ne scipovas flugi per birdaj flugiloj, sed aŭdante lin mi ĉiam pensis, ke li flugas per siaj vortoj". La universala lingvo de bestoj eĥas Esperanton. Ankaŭ la menciitaj valoroj estas komunaj al ili, kiel toleremo, amikeco, respekto, interhelpo...



**La tekstoj de ĉi-numero estis prezentitaj, legitaj, deklamitaj, luditaj... okaze de la kunveno de la 10a de marto, por festi la Printempon de la poetoj (vd LEGI 174).**

**ESTRARO**  
**de**  
**«ESPÉRANTO-GIRONDE»**

\* \* \* \* \*

Adreso ĉe la prezidanto

\* \* \* \* \*

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**  
Université de Bordeaux Montaigne

UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,  
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / [canonica.elvezio@orange.fr](mailto:canonica.elvezio@orange.fr)

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 07 46 / [janinedum@neuf.fr](mailto:janinedum@neuf.fr)

Kasisto: **Yannick DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 06 84 11 26 95 / [yannickdum@aol.com](mailto:yannickdum@aol.com)

\* \* \* \* \*

**Kontribuojn por LEGI bv. sendi al [janinedum@neuf.fr](mailto:janinedum@neuf.fr)  
aŭ al [esperanto.gironde@free.fr](mailto:esperanto.gironde@free.fr)**

